

LA PROGRESO

ĈEĤOSLOVAKA ORGANO ESPERANTISTA. ★ ĈESKOSLOVENSKÝ LIST ESPERANTSKÝ.

Aperas monate. Jara abono K 6.— (por 10 numeroj). — Redakcio: Plzeň, Radyňská ul. 10. — Administrejo: Fr. Kavan, komercisto, Plzeň, Poděbradova tř. 6. — Konto de la Poŝta Sparkaso no. 169.352. — Telefono: 732./VI. — La manuskriptojn oni ne resendas.

MIZERO DE LA LOĜANTARO EN BOHEMIO.

El prezidio de Ĉeĥoslovaka ministerio por popola provizado.

La malsupraj klasoj de la loĝantaro en landoj Bohemaj vivis dum la milito en la plej teruraj cirkonstancoj de la nutrado kiuj estis kaŭzitaj parte pro laŭplana agado de la Aŭstria registaroj, parte pro akaparo, kiu eble nenie atingis tiajn ampleksojn kiel ĵus ĉi tie. La Aŭstriaj registaroj penis per la malsatigo decimigi la Boheman nacion kaj per la pligrandiĝanta manko en la provizado alkonduki en la Bohemaj landoj staton, kiu pelus la popolon al la revolucio. La gvindatoj de laboristaj partioj sukcesis nur per uzado de ĉiu sia influo teni la paciencon kaj oferon de la laboristaro ĝis la decida momento. Por ricevi duonbulon da pano devis atendi la virinoj kaj la infanoj en »frontoj« dum frosto kaj pluvo antaŭ la vendejoj seninterrompe 2 ĝis 3 tagojn. La pano estis ofte nemangebla kaj eĉ por la sano danĝera. Por unu persono kaj semajno oni donis $\frac{1}{4}$ kg. da faruno sed ne ankoraŭ regule, krom tio estis la faruno plej parte de tia kvalito, ke estis ne eble prepari iajn manĝojn el ĝi. En multaj komunumoj oni donis nek panon nek farunon ofte dum kelke da semajnoj, eĉ dum kelke da monatoj. La viandon la loĝantaro ricevis malregule, plejmulte 10 dkg. por unu persono kaj semajno. Dum tutaj monatoj oni ricevis nenian grason. Lakto estis nek por malsanuloj nek por suĉinfanoj. Je karbo staris la virinoj tutaj noktoj en kreviga frosto kaj post du aŭ tritaga atendado oni aljuĝis al ili kvanton de apenaŭ 20 kg por 14 tagoj. Granda nombro da infanoj okaze de la karbo-provizado estis grave vunditaj kaj kelkaj estis de la karbogardistoj mortpafitaj. La Vienaj registaroj per grandaj fondaĵoj subtenis la aĉetadon de la nutraĵoj, de bru-

BIDA OBYVATELSTVA V ĈECHÁCH.

Z prezidia ĉeĥoslovenského ministerstva pro zásobování lidu.

Široké vrstvy obyvatelstva v českých zemích žily během války v těch nejstrašnějších poměrech výživy, jež zaviněny byly jednak plánovitou činností rakouských vlád, jednak lichvou, která snad nikde nenabyla takových rozměrů jako právě zde. Vlády rakouské snažily se národ český vyhladověním zdecimovati a vystupňováním nedostatků v zásobování přivoditi v českých zemích stav, který by vehnal lid do revoluce. Vůdcům dělnických stran se podařilo jen s vynaložením veškerého jich vlivu trpělivost a obětavost dělnictva udržeti až do rozhodné chvíle. Na půl bochníčku chleba musely ženy a děti čekati ve frontách v mrazu a dešti před prodejny nepřetržitě 2 až 3 dny. Chléb byl často nepoživatelný a dokonce zdraví nebezpečný. Mouky dávalo se na osobu na týden $\frac{1}{4}$ kg a to ještě ne pravidelně, při tom byla mouka většinou takové jakosti, že byla k úpravě pokrmů nezpůsobilá. V mnohých obcích ani chléb, ani mouka nevydávaly se často po kolik neděl, ba i po kolik měsíců. Masa dostávalo se obyvatelstvu nepravidelně, nejvýše 10 dkg na osobu týdně, tuky po celé měsíce nevydávaly se žádné. Mléka nebylo ani pro nemocné, ani pro kojence. Na uhlí stávaly ženy celé noci v třesnutých mrazech a po dvou až třídenním čekání dostalo se jim ho sotva 20 kg na 14 dní. Četné děti přišly na dráhách při opatrování si uhlí k úrazu a několik bylo jich hlídkami zastřeleno. Vlády vídeňské velkými fondy podporovaly nákup potravin, dobytka a všech jiných životních potřeb svými agenty pro vojsko a pro Ví-

taro, kaj de ĉiuj aliaj vivrimedoj per siaj agentoj, por la militistaro kaj por Vieno, tiel ke la Bohemaj landoj estis per ili plene elrabitaj. La enlanda loĝantaro estis devigata mem havigi al si la nutraĵojn eksterurbe en la provincoj kaj devis pagi por ili minimume tiom, kiom pagis la agentoj de la Vienaj registaroj. Ĉio, kio estis en la mastrumoj iom pli valora, litkusenoj, vestoj, tolaĵo, piedvestaĵoj, bildoj, juveloj k. t. p. estis interesantaĵoj je nutraĵoj. En multaj malriĉaj familioj pro manko de brulmaterialo oni forbrulis la lastan pecon da meblaĵo. Kiu ne havis plu ion por intersanĝo, tiu estis kondamnita laŭvorte pro malsato al la morto. Efektive ankaŭ miloj da homoj pro malsato pereis, dekmiloj forportas al si sekvojn de la nesufiĉa nutrado kaj nepriskribeblan, materian, eĉ spiritan mizeron en la malproksiman estontecon. La revolucia renverso venis en la plej urĝa tempo. Tiun tro plenigitan mezuron da sufero kaj mizero la Bohema popolo ne povus plu elteni. Post la renverso la situacio en la nutrado por kelka tempo iom pliboniĝis. La dozo da faruno kaj da pano estis pligrandigita kaj ankaŭ iom pli granda kvanto da viando en la unua tempo estis ricevebla. Sed hodiaŭ ree komencas por la Bohema popolo nova provo de granda turmento. Sekve de nesufiĉa provizo da greno, devas esti la ĝisnuna dozo da faruno kaj pano ne plenaj 2 kg. por semajno malaltigata. La provizoj de la terpomoj, kies rikolto tre suferis pro malbona vetero, estas preskaŭ plene elĉerpita, viandon la popolo ricevas malregule kaj krom tio maksimume 10—15 dkg. por 14 tagoj. La graso preskaŭ tute mankas. Lakton oni povas prizorgi apenaŭ por lulinfanoj $\frac{1}{4}$ maksimume $\frac{1}{2}$ litron por 2 tagoj. La ĝisnuna dozo da karbo 35 kg. por la semajno kaj familio nur kun grandaj malfacilaĵoj restas senŝanĝa.

Por aĉeti la bezonatajn vestojn kaj ŝuojn la popolo ne havas monon. Oni aljuĝas por la familioj maksimume $\frac{1}{2}$ ĝis 1 litron da petrolo por unu monato. Absoluta manko regas en ĉio, krom tio penas la pli riĉaj klasoj aĉetadi la necesajn nutraĵojn sekrete, kaj per tio ili pelas la prezojn ĝis ne eltenebla alteco. La fortoj de la laboristaro kaj la sano de la popolo, estas plene elĉerpitaj. La minlaboristo post dutaga laboro devas unu tagon ripozi, ke li pro malforteco ne falu. Al ĉio ĉi tio aliĝas ankoraŭ senlaboro, precipe ĉe laboristaro en teks-, metal- kaj konstruaĵindustrioj, per kio la mizero pligrandiĝas ĝis la plej alta grado. La situacio, de la popola nutrado en Bohemaj landoj estas vere terura. La

deŝ, takze ĉeské země byly jimi úplně vybrakovány. Domáci obyvatelstvo bylo nuceno sháněti si potraviny na venkově samo a muselo za ně platiti nejméně tolik, kolik platili agenti vídeňských vlád. Vše co bylo v domácnostech lepšího: peřiny, šaty, prádlo, obuv, obrazy, skvosty atd. bylo vyměněno za potraviny. V mnohých chudých rodinách při nedostatku paliva spálen poslední kus nábytku. Kdo neměl ničeho více na výměnu, byl odsouzen doslovně k smrti hladem. Také skutečně tisíce lidí hladem zahynulo, desetisíce odnášejí si následky podvýživy a nepopsatelné hmotné i duševní bídy do daleké budoucnosti. Revoluční převrat přišel v nejvyšší čas. Tu přemíru strádání a bídy byl by již český lid dále snést nemohl. Po převratu poměry ve výživě se na krátký čas poněkud zlepšily. Dávka mouky a chleba byla zvýšena a i masa bylo v první čas poněkud více. Ale dnes nastává zase českému lidu nová zkouška těžkého utrpení. Následkem nedostatků obilí musí býti dosavadní dávka mouky a chleba — necelých 2 kg na týden — snížena. Zásoby bramborů, jichž sklizeň značně utrpěla nepříznivým počasím, jsou téměř úplně vyčerpány, masa dostává se obyvatelstvu nepravidelně a to nejvýše 10—15 dkg za 14 dní. Tuky nejsou téměř úplně žádné. Mléko sežene se sotva pro kojence — $\frac{1}{4}$, nejvýše $\frac{1}{2}$ litru na 2 dny. Dosavadní dávka uhlí 35 kg týdně pro rodinu udržuje se jen s největší obtíží. Ke koupi potřebného oděvu a obuvi nemá lid peněz. Petroleje dostává se rodinám nejvýše $\frac{1}{2}$, až 1 litr na měsíc. Ve všem panuje naprostý nedostatek, při němž snaží se bohatší vrstvy nakoupiti potřebné potraviny pod rukou a vyhánějí tím jich ceny do nesnesitelné výše. Síly dělnictva a zdraví lidu jsou úplně vyčerpány. Horník po dvou dnech práce musí den odpočívati, nemá-li slabostí padnouti. K tomu ke všemu přistupuje ještě nezaměstnanost, hlavně dělnictva textilního, v kovoprůmyslu a při stavebních živnostech, čímž bída stupňuje se do největší výše. Poměry výživy obyvatelstva v českých zemích jsou opravdu hrozná. Český lid trpěl a strádal po celá 4 léta války, ale dále do

Bohema popolo suferis kaj malsatis dum plenaj 4 jaroj de la milito, sed suferi la ĝisnunan mizeron ĝi ne povas plu, se ĝiaj fortoj ne estas plene elĉerpataj, se la sano de la tuta popolo ne estas plene subfosota. Pro tio estas la rapida kaj abunda helpo el la fremdlando per la plej gravaj nutraĵoj urĝe necesa.

PRI MALGRANDA NACIO.

(Universitata profesoro dro. Fr. Mareš.)

La grandaj nacioj estas facile delogeblaj per erara doktrino de potenco kaj de fiero, per feliĉaj okazoj ili konfirmiĝas en tiu ĉi eraro ankaŭ per speciala scienco kaj filozofio de la konkreco: per materialismo, kiu priskribas la mondon kaj la vivon kvazaŭ ian simplan meĥanisman de materioj kaj fortoj kaj metas tiun ĉi meĥanisman kiel veran ordon de efektiva realeco kontraŭ la spirita ordo kiel simpla ŝajno. Tiam la potenco aperas kiel fonto de la rajto, al la potenculoj ŝajnas, ke ili rajtas ĉion fari, ĉar ili kapablas fari ĉion. Sekve kiel celo de la vivo estas laŭdegata la potenco, kaj kiel faktoro de progreso — la batalo. Dum duono da jarcento oni predikis tiun veron de korpeco, ĝis la homa meĥanismo ekmalŝanĝis je materialista frenezeco, en kiu fine la meĥanismo disrompiĝas per iu brutala okazo. La homara menso resaniĝas poste per reveno al vero de spirita ordo.

La troa supereco de korpeco ĝenas la kreadon de vivo. La granda korpo havas tro malgrandan suprajn proporciojn je la volumeno; kaj nur per la supraĵo ĝi komunikigas kun la ĉirkaŭaĵo, ricevas impulsojn, akceptas materialon. Ĝia interna kvazaŭ sufokiĝas. Tial la vivo estas kreata pli eble per multeco de etaj korpoj, ili kreas la grandan diversecon de formoj kaj individuoj, per kiuj la vivo pli eble ol per grandaj monstroj atingas la belecon, kiu estas la ekstera esprimo de la vero. La grandaj naturhistoriaj monstroj ja preskaŭ ĉiuj jam pereis kiel malprosperintaj kreitaĵoj, kaj simile detruigis ankaŭ la grandaj nacioj, kiujn ne plu unuigis la intelekta ordo, sed la brutala potenco, kaj en ilian lokon vicordigis malgrandaj nacioj, karakterizaj kaj unuecaj individuoj.

La vivo kreas por si la korpan meĥanisman kiel ilojn al plua kreado, la vivo de nacioj kreas ankaŭ meĥanismojn por siaj bezonoj: la ŝtatojn. Kaj tie ĉi precipe ekaperas la materialisma erara doktrino, laŭ kiu la ŝtato mem estas la celo, sed la vivo de la nacioj nur helpilo al tiu ĉi celo. Kaj la eraro pliiĝas ĝis al frenezeco de granda akumulado kaj senforma kreskado, kiu ne povas finiĝi alie ol per disfalo.

La granda celo de la homaro baziĝas sur unuigo de la mensoj laŭ spirita ordo. Tiu unuigo povas deveni nur el la homaj spiritoj mem, per libera rekono. Unuigi tamen la homojn per potenco, kontraŭ ilia volo, ilin katenigi per meĥanismo tiel, ke ili subiĝu al unu intelekto: tion ni nomas kripligado de la alta

savadni bídu snáseti nemůže, nemá-li býti jeho síly docela vyčerpány, nemá-li býti zdraví celého národa úplně podvráceno. Proto je rychlá a vydatná pomoc z ciziny nezbytnými potravinami naprosto nutná.

homara celo. Ĉiuj similaj provoj kompreneble malsukcesis, ĉar ili kontraŭas la vivan kreadon. Se la ŝtata meĥanismo ĝenas la vivan kreadon de la nacio, estas necese plibonigi la ŝtaton kaj ne la nacion; ĉar la kreanta faktoro estas la nacio, kaj la ŝtato estas nura meĥanismo por ĝia bezono. Ne estas eble ke la kreanta faktoro kulpiĝu per patrujperfidon kontraŭ meĥanismo; sed per patrujperfidon kulpiĝas la politikisto trouzanta la meĥanisman je domago kaj ruiniĝo de la nacio. La materialisma eraro antaŭdiris, ke nur la grandaj ŝtatoj estos eblaj. La grandaj meĥanismoj tamen fine ekhaltos kaj disfalos; ni vidas jam unu el ili en tiu ĉi stadio. En viva kreado pli bone sukcesas malgrandaj korpoj, ĉar ili ne minacas kaj ne estas minacataj per brutalaj okazoj. La titanoj interbatalas kaj la homoj liberiĝas.

La malmultenombra nacio ne subiĝas tiom facile al erara doktrino de la potenco kaj fiero, se ĝi ne estas trompata per feliĉaj okazoj. Ĝi ne povas apogi sin je potenco kaj tial ĝi serĉas la firman fundamenton en intelekta ordo. Ĝi direktigas sian menson al vero; tiu estas por ĝi la bazo de rajto favora por ĉiuj, ne la potenco, kies rajto estas maljustaĵo al ĉiuj. La malmultenombra nacio ne enfalas en materialisman frenezcon, ĝi preferas fantaziojn pri altaj idealoj. La religiaj idealoj akiris ĝuste ĉe malgrandaj nacioj la plej profundan sindonecon kaj la plej fervoran disciplaron. La klereco, ĝi estas la vivo laŭ spirita ordo, disvastiĝas en malgranda nacio facile en ĉiujn tavolojn, ĉar la supra tavolo estas tro delikata kaj ne kapablas tute sola porti la civilizacian ŝarĝon. En granda nacio la civilizacio restas nur sur tiu ĉi supraĵo, ne atingas la pli profundajn tavolojn, kiuj kulture sufokiĝas kaj kripliĝas sen lumo.

Ju pli malgranda nacio, des pli multe da kleruloj ĝi povas elteni kaj des pli multe da individuoj povas esti aktivaj por spirito de la nacio tiel ke ĝia kultura kreado povas kreski ĝis granda alteco. En granda nacio ne okazas malmildaj diferencoj inter la individuoj kaj la apartaj klasoj; ĉiuj estas reciproke pli proksime kaj pli unuigitaj en spirito. Tie ĉi ne ekzistas grandaj riĉaĵoj, kiuj rapide traktas al potenculoj; sed tie ĉi ankaŭ ne ekzistas malriĉeco. Tie ĉi mankas lekspluatado de unu per la alia, ne ekzistas envio kaj malamo. Tio signifas: ĉio ĵus dirita ne bezonas necese esti en malgranda nacio, kio neeviteble ekzistas en nacio granda. La malgranda nacio estas pli proksime al regno de Dio: ĉar al malgrandetuloj ĝi estas promesite.

(Tradukis Rudolf Fridrich).

J. S. SETKAL:

SONORILOJ DE LORETA.

Turhorloĝo ekmoviĝis.
Aŭdu! La kvarono,
dua, tria, tuta horo.
Kia dolĉa sono!
Ludas tra l'aer' varmeta
sonoriloj de Loreta.

Serioza melodio
flugas al ĉielo,
menson pie ĝi agordas.
Gojas la orelo
Vin aŭskulti ĉiam preta,
sonoriloj de Loreta!

Kiam ajn eksonas Via
voĉo delikata,
ĉarman mi revivas tempon
de feliĉ' sentata
dum vespera hor' kvieta,
sonoriloj de Loreta!

JESA:

KIU LI ESTAS.

Kutima kunveno de esperantistoj.
Ĉiuj konas sin reciproke — almenaŭ
laŭ vizaĝoj aŭ titoloj.

Estas ĵus komencota la poresperanta
parolado de S-o Ikso. Oni anoncis la
paroladon en ĵurnaloj, ne forgesante al-
doni la frazon, ke »la gastoj estas bonven-
ataj«.

La surmura horloĝo jam montras la
tempon, en kiu la parolado estis difinita,
la horloĝo jam montras, ke de tiu tempo
pli ol unu kvaronhoro pasis, sed oni an-
koraŭ ne ekkomenciĝas, S-o la parolanto
ankoraŭ ne venis — ho, eraro! Li jam
eniras. —

Kaj nun — inter vico da malfruigitaj
samideanoj (ĉiuj estas konataj, ĉiuj sin
amike bonvenas kaj diras komplimentojn)
venadas iu — li estas eble studento — aŭ
oficisto — aŭ instruisto — kiu scias?

Sed — li legis la ĵurnalon, li jam de
longe interesiĝas pri »nia sankta afero« —
do li venis. — — —

Li deziras esti informata —

Li ie kaj iam aŭdis, ke la esperantistoj
estas preskaŭ fratoj, ke ili predikas la in-
terfratiĝon de la popoloj — kaj nun,
hodiaŭ, li, kvankam samnaciono, la unu-
anfojon ekkuraĝiĝis veni inter ilin.

Hazarde li sidiĝis ĉe la tablo kontraŭ
unu bela sinjorino —

Kaj ŝi, vidu, ŝi surhavas ian signon,
certe esperantistan signon —

Ĵus li volis demandi, ĉu lia opinio estas
prava — kiam ia alia sinjorino demandis
lian najbarinon — pri li — ho, jes, li bone
aŭdis, kiel la unua diris:

»Kiu li estas?«

La dua respondis:

»Kiu scias...«

Ŝi ridetis — kaj ambaŭ sinjorinoj ek-
komencis amuzi sin en la nacia lingvo
pri la aferoj, kiuj lin neniel interesis —

Li ekridetis ankaŭ kaj sentis sin
fremda, tre fremda...

Kaj li tamen ĉeestis la kunvenon de la
esperantistoj, kiuj celas la tutmondan
fratecon...

PORTU LA SIGNON!

Antaŭ nelonge vizitis min unu el la
malnovaj ŝatindaj esperantistoj el Germa-
nujo, kiu dum nia agrabla interparolado
mencis la fakton, ke li renkontis en Praha
eĉ ne unu homon, portantan la signon de
la esperantistoj. .

»Diru al viaj samlandanoj«, estis liaj
vortoj ĉe la disiro, »ke ili portu la signon!«

Versimile tiu ĉi samideano kaj eĉ la
aliaj, kiuj alvenos Praha'n, rajtos pensi, ke
ni ne ekzistas — aŭ ke ni ne estas sufiĉe
servemaj al la fremduloj? Kaj tamen inter
la loĝantaro de nia ĉefurbo estas sufiĉe
da flue parolantaj esperantistoj. kiuj certe
ne estus embarasitaj, se iu ilin alparolus..

Kial do tiuj ĉi ne portas sian signon?
Ĉu pro timo? (Oni rakontis al mi, ke iu
el la »ĉefesperantistoj« rifuzis porti ĝin
pro la malpermeso de la oficoj — ĉu li
estis prava?).

Aŭ ĉu ili hontas pro ĝi?

Eble ili senintence faras tiel, opiniante,
ke ili kun neniu fremdulo sur la strato
renkontiĝos.

Estu la kaŭzoj kiaj ajn, tamen ŝajnas
al mi, ke nun kaj precipe nun, ni kaj
precipe ni, geesperantistoj en Praha, devas
ĉiam kaj ĉie porti la signon.

Kio ne estis hieraŭ, povos okazi morgaŭ
kaj kiu el ni ne ĝojus, ekkoninte kaj in-
terparolinte kun fremda samideano es-
perante?

Kion ni pensus, troviĝante en fama ĉefurbo de ia ŝtato, pri kiu ni antaŭe estis legintaj, ke ĝi estas sidejo de unu aŭ du centraj organizacioj, de tiom kaj tiom da grupoj k. t. p. kaj poste, estante kelke da tagoj en tiu ĉi urbo, ni renkontus ne niun samideanon? Ĉu ili ĉiuj mortis?

Ho jes, hazarde povas okazi, ke ĵus neniŭ el ni trapasos la straton, en kiu vagas la sopirema fremda verdstelulo. — —

Sed — oni eble diros al mi — pro kio »la oficejo en kafejo « »Union« kun sia ĉiutaga deĵorado de la 3a—5a posttagmeze?

Jes, mi scias, la fremduloj povos sukcese uzi tiun ĉi servon, se nur — — —

Ne estis mia intenco pledi aŭ plendi pri »nia konstanta deĵorado en kafejo « »Union«, neniŭ, mi volis nur citi la vortojn de la trapasanta samideano kaj plenumi tiel lian deziron.

Memkompreneble ke precipe ni, kiuj instruas aŭ gvidas esperantajn kursojn, zorgos pri tio, ke neniŭ el la komencantoj, nesciantaj ankoraŭ paroli, portu la signon, kiu apartenas nur al serioza kaj konscia esperantisto! Julie Šupichová.

Svitbert J. Degenkamp, Utreĥt:

LA VENKITA POPOLO.

Estas vere mirinde, ke en la Germana imperio okazis la revolucio en tiom mallonga tempo. Precipe en la sudgermanaj ŝtatoj la revolucio pasis tiel trankvile, ke ekzemple en Bavario sufiĉis kelkaj horoj, por fari la regnon respubliko. La enloĝantoj de Munĥeno dum unu nokto ĉeestis revolucion eĉ ne rimarkante aŭ vidante ion de ĝi.

Preskaŭ neniŭ protestis por konservi la imperiestron, reĝojn kaj princojn, eĉ ne por ilin defendi. Apenaŭ oni povas kredi, ke ĝi okazis en Germanio, en la lando, kie oni tiel ege respektis la regantajn dinastiojn, kie oni kredis estrecon kaj disciplinon netuŝeblaj.

Tamen en Germanio ekregis haoso kaj oni serĉas la viron, kiu sciis krei novan ordon. Kaj estas sendube, ke tiu viro estos helpata de la plimulto de la germana popolo, kiu sincere deziras, ke finiĝu jam la bataloj kaj disputoj inter kelkaj grupoj, kiuj direktas la landon en abismon. Oni deziras registaron, kiu prenos la bridojn kaj per agoj montros sin kapabla savi la tutan popolon kaj direkti la ŝtatmaŝinon sur ĝusta vojo.

Kaj kial la plimulto da milionoj de la

popolo lasas sin servutigi, ne kontraŭgante?

Tiu ĉi senenergia indiferenteco de la iam tiel decidema kaj energia germana popolo estas klarigebla.

Dum kvar longaj jaroj ĝi vivis en la forta, de la regantoj instigita konvinko, ke ĝi batalas por brila estonteco, kiu komenciĝos post neevitebla malvenko de la malamikoj. En tiu ĉi espero la popolo toleris ĉion. Senkomparajn oferojn ĝi donis en multegaj homvivoj kaj suferante malsaton eĉ premegantan mizeron.

Kiam fine venis la malĝoja seniluziigo, kiam okazis la »débaclé«, kiam Germanio estis venkita kaj humiligita, kiel neniam iu Germano povis esti supozinta, tiam la artifice streĉitaj nervoj estis ege tuŝitaj kaj malvigligis la korpoj eĉ animoj tiel ĝenerale, ke neniŭ havis plu la forton por doni bonan direkton.

Kaŭze de nesufiĉa nutrado malfortiĝis la popolo fizike, kaŭze de neefektiviĝo de la bele imagita venko, ĝi ankaŭ rompiĝis psike. Nun ĉiu atendas nuran vivsavon por si eĉ por sia familio.

Sed kio estas la plej grava: Germanio sentas sin tute forlasita. Ĝi konsciiĝas, ke la »Pan-germanistoj« tro laŭte kaj antaŭtempe kriis sian »Deutschland über alles«, ke ĝiaj direktintoj kun tro aroganta fiereco forĵetadis la naciecajn aspirojn, rompante la deciditajn kontraktojn.

Jen ĝi staras sola kaj tute senforta, dum ĝi estas ĉirkaŭata kaj atakata de preskaŭ ĉiuj popoloj, kiuj postulas ĝian punigon pro mortpafitaj burĝoj, forbruligitaj kaj detruitaj urboj kaj vilaĝoj, pro subakvigitaĵoj ŝipoj, difektitaj arttrezoroj, mallonge dirite, pro la teruro kaŭzita de germanaj soldatoj.

Tiu ĉi konscio, tiu ĉi forlasiteco malvigligis eĉ la plej bonajn el la popolo. Jen estas la kaŭzo de la indiferenteco, kun kiu la plimulto akceptas la nunan staton de anarkio, kurbiĝante antaŭ la bando de uzurpuloj sen iu ajn respondeco.

Kaj tamen estas tre necese, finigi la staton de anarkio, nun reganta. La vundoj kaŭzitaj de la milito devas esti kuracataj, kaj por tio ne kapablas la »Arsol« — konsilantaroj. La lando devas esti protektata kontraŭ malsato kaj mizero. La Germana regno devas trankviliĝi, kaj la trankvilon ne alportos al ĝi la revoluciemuloj.

Jen ĝi estas la venkita popolo, kun malamiko en sia hejmo, detruita pro internaj malpaco kaj malharmonio.

Evidente devas efektiviĝi la Paco, antaŭ ol aperos la viro, kiu relevos Germanion el izoleco. Sed tiam li antaŭe forigu la bolŝevismou, kiu ĝis nun ne povis esti ekstermita de la ordamaj partioj.

F. Ŝilha:

ESPERANTO EN SERVO DE „PERFIDULOJ“.

Konstante oni okupiĝas per »antaŭdiluvia« Aŭstrio kvankam ĝi tute ne meritias tion. Eĉ mi hodiaŭ tamen ĝin tuŝos, sed pli ol pri ĝi, mi parolos pri tio kiel ankaŭ esperanto — eĉ se tio estas malmulte signifa — partoprenis renverseman laboron kontraŭ monarĥio. Mi nome intencas rakonti pri dumilita esp. korespondado kaj pri la metodoj, kiujn oni devis uzi, se oni reciproke volis esti informitaj laŭ vero.

Tuj komence de milito la korespondado estis haltigita. Unu el malmultaj landoj, kiuj faris escepton, estis Italio, kie mi havis du bonajn, sincerajn amikojn. Nia korespondado, dank' al severa aŭstria cenzuro, estis neinteresa, nepovante informi pri politikaj kaj militistaj aferoj. Kaj ĵus tiajn raportojn oni bezonis, precipe tiam, kiam post grandaj malvenkoj de centraj ŝtatoj ilia publiko estis trompata per mensogemaj raportoj de Austria koresp. kancelario. Plej frue oni povis trompi la cenzuron per tio, ke ni envovis la presaĵojn en germanlingvaj gazetoj. Efektive komence ni sukcesis; sufiĉis ĉirkaŭvolvo per »Berliner Tagblatt« por ke la cenzuro stampu la sendaĵojn per stereotipa »Zensuriert; kann weiter gehen«. Tiameniere oni sciiĝadis el »Stampa«, »Corriere de la Serra« k. a. italaj gazetoj la sensaciajn tiam novaĵojn pri grandaj malvenkoj apud Lwów, San, Zemun k. t. p. — Foje la poŝtisto alportis el Italujo germanlingvan katalogon de berlina librovendejo. Kial do? Post momento ĉio klariĝis; atente foliuminte proksimume ĝis mezo de katologo, oni aperigis inter du parte kungluitaj folioj eltranĉaĵon el itala gazeto, anoncanta al mondo, ke oni sukcesis, malgraŭ severa ĝendarma aŭstria kontrolo, kontrabandi en Italujon

esperantan leteron el Praha, en kiu Bohemoj plendas kontraŭ persekutado de sia nacio, kie ili ĝojegas pro proksimiĝado de rusa venkanta armeo, preparante sin je pompa bonveno de siaj liberigantoj kaj certigas la Ententon, ke la bohemiaj pafiloj ne trafas . . . — Ho, kel ni nemultaj konsekretarioj ekĝojis, posedante la dokumenton, diratan (unuan fojon dum milito) al mondo la veran konvinkon de ĉiu Ĉeĥoslovakio. Tio okazis fine de la jaro 1914, kiam la ekspedo de alilandaj presaĵoj estis haltigita. Restis do nur poŝtkarta raportado. Tiam venis al mi ideo, skribi la danĝeran tekston sub la poŝtmarkojn. Por ke mi atentigu pri tio miajn int. korespondantojn, mi enmetis la vortojn »Legu sub marko« en la adreson, sed pro pli granda certeco mi disigis la vortojn jene: Al le gusu bmarko X. J. en Z.« kaj efektive estonta respondo el Italio uzis jam la saman metodon. — Pro la singardemeco oni ŝanĝis sur la p. k. la manuskribton, oni subskribadis sin per elpensitaj nomoj kaj la kartojn oni metadis en la vagonaron aŭ en leterkestojn de tute aliaj urboj. Oni informis la fremdlandojn pri malbonfama aŭstria situacio, pri sopiroj de Ĉeĥoslov. nacioj, la Italiojn oni instigadis al baldaŭa interveno k. t. p. Ni kontraŭe estis informitaj laŭ vero pri batalejaĵoj okazintaĵoj, pri Ĉeĥoslovakaj transkurintoj, pri la prearo de Italio al milito jam kelke da monatoj antaŭe. Italan demandon: »kiel vi Bohemoj ne revolucias«? oni respondis sub la p. mj, uzinte pro singardemeco anstataŭ nomo Bohemoj, nomon Rusoj. Sed itala korespondanto ne komprenis, riproĉante en plej proksima p. k., ke li deziris scii, kial ni Bohemoj, ne revolucias. Tuj oni klarigis ĉion al li, kaj de tiu tempo ni komencis uzadi eĉ tiun ĉi novan metodon. La saman manieron de raportado oni estis uzontaj por la raportado por italaj ĵurnaloj eĉ dum Ital-Aŭstria milito, trans Svisujo, sed la aliĝo de Italio al Entento kaŭzis la malpermeson, skribi eĉ Svisujon. Tuj poste komencis longa terura periodo por bohemiaj esperantistoj kaj ili devis nur esperi je pli feliĉa estonteco. Tiu tempo ĵus alvenis, dank' al venko de la Justeco, kaj ĉeĥoslov. samideanoj re-servos sin al ĝi per tio, ke ili ĉiam kaj ĉie batalos en ĝia nomo kaj por ĝia venko ĝenerala.

KIEL FARTAS WILHELM II.?

Nia holanda raportisto s-o, S. U. Degenkamp sciigas al ni la jenon:

Raportisto de nederlanda gazeto »De Maastbode« interparolis kun malnova konato de la eksimperiestro, al kiu oni permesis viziti la iaman monarĥon okaze de lia naskiĝtago. Jen lia sciigo:

Kvankam estis farita ĉio ebla por pasigi la tagon kiel eble plej feste, tamen oni ne sukcesis vekti la eksimp. el la stato de grava malsaneca maltrankvilo, kiun li suferas.

La antaŭ ne longe entreprenita provo de amerikaj ĵurnalistoj enpenetri lian restadejon ankoraŭ pligrandigis lian maltrankvilecon. Li ektimiĝas tuj, kiam iu al li alproksimiĝas.

Kiam la vizitanto, kiu — kiel dirite estas malnova konato de la eksimperiestro, alpaŝis al li, la eksregnestro ektimigite faris kelkajn paŝojn malantaŭen. Li ne rekonis sian amikon, tial li devis prezenti sin al li. Tiam la memoro de la iama regnestro revekiĝis, kaj li, kvazaŭ atendinte iun renkonti por eldiri al li ĉiujn siajn ĉagrenojn, per fluo da vortoj malŝarĝis sian animstaton.

Nia konato pro du motivoj opiniis konsilinda ne komuniki ĉion, kion diris la imperiestro: unue, pro kompreneblaj politikaj motivoj, due, ke ĉio eldirita faris la impreson, ke ĝi devenas de la homo, kiu estas proksima al tuta senenergiĝo.

Li parolis jen pri tio, jen pri io alia, kaj kelkafoje ŝajnis, ke li ne komprenas sian veran pozicion. Tamen oni povas komuniki tion, ke li opinias sin trompita. Liaj generuloj, liaj konsilintoj, liaj diplomatoj, la katoj, judoj, framasonoj, ĉiuj estis lin trompantaj, li opinias.

Kiel la imperiestro ne rekonis la vizitanton, preskaŭ tiel same okazis eĉ reciproke al la vizitanto. Li certigis, ke, se li estus renkontinta la eksimperiestron en la strato, li ne estus rekoninta lin. Lia iama kvazaŭ rigida sintenado tute malaperis. Oni prezentu al si maljunulon apogintan je bastono, kliniĝintan kaj elvivintan, kun neĝoblanka hararo kaj vestitan en ne prizorgita uniformo, kiu ŝajnas malpreme pendi sur lia korpo. Li ektimiĝas pro ĉiu brueto kaj ofte senkaŭze foriĝas. Kiel korpe kaj spirite rompita homo moviĝas la iama imperiestro de Germanio tra la salonoj de sia nuna rifuĝejo en Amerongen.

VIENAJ TEATROJ.

(De nia raportisto F. W. Illing.)

En la unuaj tagoj, de la novnaskita Germanaŭstria respubliko, kiam oni forigis ĉiujn memoraĵojn je la imperio, respublikaniĝis ankaŭ la Vienaj teatroj. La »K. u. k. Hofoperntheater« kaj la »K. u. k. Hofburgtheater« lastavice ŝanĝis siajn nomojn. La malnova »Theater in der Josefstadt«, la »Carltheater« kaj aliaj, kiuj memorigis al fremdulo, ke li troviĝas en »imperiestra urbo«, forigis la dukapan aglon kaj la titolon »k. u. k. priv.« el la teatraj anoncoj. Sed la malnovaj kaj al ĉiu

Vienano karaj nomoj restos konservataj. La opera teatro estas nun simple nomata »Operntheater«. Ĉu la oficiala titolo estos iam »ŝtata« aŭ »nacia«, mi nun ankoraŭ ne scias. El la programoj de la »Kaiser Jubiläumstheater« (Popola operejo) malaperis nun la nomo kaj ŝildo de la imperiestro Franz Joseph, por fari lokon al grandlitera vorto »Volksoper«, kiu jam pli frue estis popola nomo de la teatro.

Sed oni ŝanĝis ne nur la nomojn de la teatroj, sed eĉ de la teatraĵoj. La opereto »Je ordono de imperiestro«, kiun antaŭe la cenzuro permesis ludi sole sub la nomo »Je ordono de dukino«, estas nun prezentata sub sia originala titolo. Aliflanke oni multe ŝatas la liberecajn verkojn, kiel ekzemple »Wilhelm Tell« kaj »Julius Caesar«, ludatajn en »Burgtheater«.

LETERO.

Tre estimata samideano!

En Viena gazeto (»Nova Viena Ĵurnalo«) mi legis antaŭ ne longe jenan mallongan artikolon, sub la titolo »kongreso de paco kaj mondlingvo«: »Kvazaŭ la kongreso de paco ne havus sufiĉe da laboro je la reordigo de nia mizera malnova Europo, ĝi (la kongreso) ankaŭ okupiĝu pri la demando de la enkonduko de ĝenerala mondlingvo, de Esperanto«. Kaj nun raportas la gazeto, ke jam adresis la angla Esperanta ligo tiurilatan referaton al la angla registaro, ke la germania Esperantistaro sammaniere agis je la komitato por preparo de Tutmonda ligo de la popoloj, kaj ke en Svedujo same vigle agitas la tieaj Esperantistaj.

En Bern, la svisa metropolo, okazos la »Internacia socialista kongreso«. La tutmonda socialistaro kiel klera, progresema intelektularo, jam de longe akceptis simpatie Esperanton: Komparu la internacian esperantan gazeton socialistan, jen la centra organo: »Internacia socia revuo«, »La Kulturo« (por Bohemoj) »Le Travailleur Esperantiste« (por Francoj), »Antaŭen« (por Germanoj). Komparu plue la »Laboristan Internacian Kantaron«, el kiu mi citas: »Ruĝa standardo« (socialista marŝo), »Mallibereja kanto« de N. Zoula. Plue konferencaĵo de Enriko Ferri: »Kio estas socialismo?« La internacia socialistaro povas forte kaj potence antaŭen puŝi la tutan Esperantan aferon kaj same grave subteni la enkondukon de Esperanto en la »Tutmondan Ligon de la popoloj.« **Jen estas por la tuta Esperantistaro la momento por efike prezenti Esperanton antaŭ tutmonda forumo**, kiu jam de longe bone komprenis, ke la eldiro: »Proletarioj el ĉiuj landoj unuigu!« povas nur efektiviĝi, kiam oni scipovas ununuran lingvon, la plej facilan el ĉiuj vivantaj lingvoj Esperanton. Jen iru, Esperantistaro, sendu viajn deligitajn plej taŭgajn, por ke ili reprezentu **en tiu ĉi por ni decida horo** nian aferon! kaj ne forgesu, ho Esperantistaro, atentigi la kongreson pri la malgranda, sed grava kaj vere dica verko de D-ro Zamenhof: **»Deklaracio pri homaranismo!«**

Vivu kresku floru por la bono kaj beno de la homaro la socialismo kaj la popoluniga Esperanto! Vivu la socialismo, la bravega sentima pioniraro por vera hominda kulturo, vivu la lumon alportantoj! Kaj venku ĉie vero kaj justeco kaj interpaciĝo!

Alfred Siebenschein.

LINGVOJ, EN KIUJ ONI TRAKTIS LA PACON.

Se ni malfermas libron de la historio, ni tuj vidas ke en la mezo de la dek-sepa jarcento uzadis la diplomatoj ĉe la pactraktado sole lingvon latinan. Sekve la Vestfala pactraktado, per kiu estis finiĝinta la tridekjara milito (en la jaro 1648) estis pritraktata latine. Francoj faris tiam la unuan provon, pritrakti la pacon en lingvo Franca. Sed la Germanoj protestis, kaj volis uzi lingvon germanan. Pro tio oni estis devigataj uzi denove la neŭtralan lingvon latinan. De tiu tempo komencis la franca lingvo pli kaj pli enpenetradi en la diplomatiajn rilatojn kaj dum la traktado en Raŝtad, en la jaro 1714 inter Francujo kaj Aŭstrio oni uzis jam oficiale lingvon Francan. Tiam postulis princo de Savojo kiel Aŭstria reprezentanto, ke la teksto de la kontrakto estu en lingvo latina.

Kontraŭ tio protestis marŝalo Villags la reprezentanto de Francujo kaj venkis lia propono ke oni traktu la pacon en lingvo franca. De tiu tempo ĉiuj internaciaj kontraktoj estis skribitaj en lingvo franca sed sub la kondiĉo, ke oni ĝin uzu »escepte« anstataŭ la latinan lingvon.

En la jaro 1763 post sepjara milito inter Aŭstrio, Prusujo kaj Saksujo oni forigis tiun escepton, kaj la franca lingvo estis definitive proklamita kiel diplomata lingvo. En la lasta tempo certaj kontraktoj inter Anglujo, Ameriko kaj Japanujo estis skribitaj angle, per tio falis la privilegio de la franca lingvo kiel lingvo diplomata. — En la nuna mondmilito la pactraktado inter Rusujo kaj Germanujo, okazis parte ruse, parte germane. En Brest Litevski estis akceptitaj lingvoj: Rusa Turka, Bulgara kaj Germana, sed tio estis sole formalajo, la ĉefaj kontraktoj estis skribitaj nur en Franca lingvo. Sekve la historio montras al ni ke la diplomatoj uzis plejparte la Francan lingvon. Sed la Angla lingvo estas tamen plej multe disvastigita. Tial aperas demando, ĉu Angloj estonte toleros tion. Josef Pech.

ĈADA:

Amu la infanojn! Ne nur la viajn, sed bohemiajn infanojn, ĉiujn infanojn! Komencante kun la viaj, ame karesu eĉ la aliajn infanojn! Zorgeme kaj sen antaŭjuĝo ekkonadu eĉ la infaninojn de la aliaj gepatroj, por ke neniu estu »fremda« por vi! Zorgu pri viaj eĉ pri la fremdaj infanoj, helpadu, ĝis kiam viaj rimedoj kaj kapableco permesas tion, por ke ekreskadu kaj ekfloru kiel eble plej bone la zorgo pri la bohema infano!

Trad. »Roudeto de esperantistinoj en Praha«

ĈEĤOSLOVAKIO.

La decido pri Těšín (Teschen) profunde okupas la sentojn de ĉiu Bohemo, sen diferenco al kiu socia klaso ĝi apartenas. En la hejmoj, en gastejoj eĉ sur la stratoj oni neĉesas diskuti pri la Pariza decido, kiu unuanime estas prijuĝata kiel peko kontraŭ la rajtoj de bohema nacio. En gazetoj, per mitingoj kaj kunvenoj oni protestas kontraŭ la fordonado de Silezia regiono kaj riproĉas la regist. ke ĝi per sia subskribo aprobis la parizan kontrakton novembran. Cesis subite la karnavalaj amuzadoj kaj la nacio fordonas sin al la funebro. La nacio, per sia spirito tute fordonita al Entento, kaj per la Pariza decido en siaj sentoj dolorigita kaj tuŝita, mirigite demandas, ĉu la Entento efektive intencas fortranci de la historia teritorio Bohemia la regionon, kiu havas por la ŝtata ekonomia vivo senkomparan gravecon. La Entento per sia decido pri Těšín faris eraron, ĉar ĝi estas nek per historiaj, nek per etnografiaj motivoj pravigebla. Jen, kion kaŭzas malbona informiteco!

Mizero en Ĉeĥoslovakio minace montras sian vizaĝon. Sajnas, ke la tri jarcentoj de politika turmento sub la jugo de Habsburgoj, el kiu la Bohemoj estis liberigitaj de siaj amikoj, estos kronitaj per turmento materia. Granda mizero estas rimarkebla en ĉiuj fakoj de la industrio, kiu suferas pro manko da plej gravaj materialoj, sed vera katastrofo proksimiĝas koncerne la nutraĵojn, preĉipe en la klasoj malsupraj. Dolore estas rigardi la longegajn »frontojn« da palaj, malgrasaj virinoj kaj infanoj, starantaj antaŭ la nutraĵvendejoj, kaj atendantaj la momenton, kiam oni komencos vendi cindrosimilan farunon, dio scias el kio preparitan panon, bovan aŭ ĉevalan viandon (porkaĵo de longe ne estas aĉetebla) k. t. p. En tre malfacila situacio troviĝas la Ministerio por popola provizado kaj la ministro Dro. B. Vrbenský, kiu sincere penas prizorgi la necesajn nutraĵojn. Sed la penado estas preskaŭ senrezulta, kvankam oni ordonis la plej severajn rekviziciojn ĉe la kamparanoj, ĉar kie nenio estas, tie ankaŭ nenio estas prenebla. En la nuna situacio unu estas certa: Ĉeĥoslovakio troviĝas antaŭ aprovizia katastrofo, kaj tiun ĉi staton la ministerio kaŝas, timante malrankviligi la popolon, ĉar ĝi ĉiam ankoraŭ esperas helpon de Entento. Estas demando, ĉu tiu ĉi helpo venos, kaj ĉu ĝi ne venos malfrue.

Markado de banknotoj. Dum la milito devis la Aŭstria monarkio subteni la internan pacon per pagado de nutraĵaj kotizoj. Krom tio ĝi bezonis multe da mono por aĉeti la objektojn, necesajn por la militado, kaj ĉar dum la longa daŭro de la milito la metalaj pagiloj elĉerpigis, oni senĉese pligrandigadis la cirkuladon de banknotoj. En fabrikado de banknotoj estis Aŭstrio vera majstro. Ili estis fabrikataj ne nur en Vieno, sed eĉ en Budapeŝto, kaj tiamaniere la monto da banknotoj mirinde kreskis. Tuta monarkio nun droniĝas en banknotoj, kiuj abunde amasiĝis ĉefe en la manoj de la personoj riĉiĝintaj dum la milito, kaj gvidas la landojn de lama Aŭstrio al bankroto. Ĉeĥoslovakia financa ministerio de-

tale studis la problemon, kiel reguligi la internacian valuton de la juna respubliko kaj konsiderinte, ke pro absoluta manko da materialoj ne estas eble savi sin per eksporto de diversaj komercaĵoj, kaj tiel subteni la ŝtatan kredition, decidis forigi parton de la senvaloraj banknotoj, troviĝantaj en Ĉeĥoslovakio. Ĉar oni spertis, ke la Aŭstria kaj Hungariaj ŝtataj presejoj ankoraŭ nun multope fabrikas la senvalorajn banknotojn por kiuj oni aĉetas en Ĉeĥoslovakio diversajn produktojn kaj komercaĵojn kaj tiamaniere pli grandigas la nacian mizeron, la ministerio ordonis signi la reston de la banknotoj troviĝantaj en Ĉeĥoslovakio per speciala impostmarko, kaj tiel dividi ilin de la banknotoj aŭstria kaj hungariaj. Tiu ĉi markado okazas de la 3.—9. marto kaj post tiu ĉi limtempo la nemarkitaj banknotoj estos senvaloraj. Prezente siajn banknotojn por la markado, la publiko ricevas reen nur 50% de ilia sumo kaj por la resto oni ricevas ŝtatan ŝuldopromeson rentumotan per 1%. La bankoj, ĉe kiuj okazas la markado precize notas la prezentitan sumon por havigi al la Financa ministerio la veran bildon de la ŝtata financa situacio, laŭ kiu la ministerio aranĝos la necesajn reformojn por plibonigi la ŝtatan valuton.

	DIVERSAĴOJ.	
---	--------------------	---

Nia administracio sciigas, ke la 4. numero da La Progreso estos sendita nur al la abonantoj. — Ĉion, kio rilatas la enhavon de nia gazeto oni adresu al: Redakcio de La Progreso Plzeň, Radyňská 10., ĉiujn mendojn de la gazeto oni adresu al: Administracio de La Progreso, Plzeň, Poděbradova 6. — La abonoj de la gazeto Esperanto el Ĉeĥoslovakio povas efektiviĝi nur per helpo de nia administracio, ne estas necese rilati direkte kum ĝia administracio en Genevo. Ankaŭ la anoncojn por Esperanto kaj kotizojn por U. E. A. oni pagu ĉe nia administracio. Ĉiun pagon ni tuj sciigas al U. E. A., kiu mem ekspedas la gazeton al la abonintoj. — Nia gazeto havas konton ĉe la Poŝtaj ŝparkasoj en Vieno kaj en Praha. Por ambaŭ ŝparkasoj oni uzas la saman transpilon. La abonantoj el Ĉeĥoslovakio kiuj pagas la abonon per helpo de niaj transpiloj de la poŝta ŝparkaso, bonvolu ilin signi per ruĝa kruco, por tiel atentigi la poŝtofficjon ke ili estas direktotaj al Praha kaj ne en Vienon.

Nia ĥodiaŭ ĉefartikolo estis al ni sendita de Ĉeĥoslovaka ministerio por popola nutrado. Ĉar ĝi prezentas absolute veran oficialan sciigon pri la stato de nia respubliko, ni kore petas niajn eksterlandajn amikojn, ke ili traduku ĉi tiun artikolon en sian gepatran lingvon kaj sendu ĝin al la redakcioj de ĉefaj naciaj gazetoj, atentigante, ke ĝi estas oficiala informo de nia ministerio. Ni petas sendon de la gazeto en kiu la traduko aperos. Ni petas helpu al ni!

Arĥivo de ministeria prezidio petas nin esprimi jenan atentigon: Ĉiuj eldonantoj en Ĉeĥoslovakio, kiuj laŭ la 18. § de la presa leĝo estis devigataj sendi ekzempleron de gazetoj

kaj libroj al la ministeria prezidio en Vieno, adresu nun la rilatajn ekzemplerojn al: Archiv ministerského presidia, Praha IV., Hrad, příz. — La ekzemplerojn aperintajn de la 28. okt. 1918. oni sendu aldone.

Ĉeĥoslovaka Esper.-oficejo en Praha III., Nerudova ul. 40, III. p. (fondita de s—o. Aug. Pitlík), aranĝas Esperanto-propagandon, informas fremdlandon pri kultura celado de ĉeĥoslovaka nacio kaj donas eĉ komercajn informojn. (Vidu la anoncon.)

Novaj lernolibroj kaj vortaroj por Bohem-oj. La eldonantaro de La Progreso traktis en sia kunveno okazinta la 21. febr. pri la manko de helpiloj konvenaj por esperantaj kursoj kaj komisiis s—on. B. Tittl per ilia verko. La vortaroj (bohema-esperanta kaj Esperanto-bohema) enhavas la vortojn uzatajn en ordinara vivo, la lernolibro gramatikan analizon kaj legajojn.

Esperanto en praktika uzado. Unu el modeloj, kiel oni povas apliki Esperanton al la komerco prezentas la sciigo, kiun ni ricevis el la direkcio de la urba elektrejo en Plzeň: La firmo petis siajn komercajn amikojn en fremdlando, de kiuj ĝi mendas diversajn komercaĵojn, uzi en la reciprokaj rilatoj lingvon ĉefan aŭ Esperanton. La respondo estas vere interesa: Vico da firmoj respondis ke estas por ili malfacile korespondi ĉefe, sed, ĉar oni povas tre facile trovi esperantan korespondanton, oni uzu Esperanton. Ni rekomandas al niaj komercistoj ĝeneralan sekvon de tiu ĉi ekzemplo, kiu ne nur plifaciligos ilian laboron, sed eĉ helpos al disvastigo de Esperanto en komerca uzado.

Novaj libroj: Vintraĵ fabeloj, eldonita de Ader & Borel, Dresden, kaj Esperanta legolibro eldonita de Eldona akcia societo Otava el Helsingsfors, Finlando. Pro manko da loko ni recenzos ilin ĝis en la venonta numero.

Personaĵo. Komponisto Jos. Horák, vicprezid. de Esp. klubo en Plzeň, antaŭe kapelestro de la 69. hungara regimento estis nomita de »Ĉeĥoslovaka ministerio por nacia defendo« kapelestro ĉe la Regimento de nacia libereco en Plzeň.

La Progreso, jarkolekto 1918. kun interesa enhavo estas aĉetebla por 4.50 K (2 frankoj) ĉe la administracio en Plzeň, Poděbradova tř. 6.

KRONIKO.

Praha. La Ligo de boh. esperantistoj aranĝas konversacian kurson en la Supera knabina lernejo Praha II. okazanta ĉusabate de la 7.—8. vesp. La kurso enhavas legadon, gramatikajn analizojn kaj diskutojn. — Esperantista klubo en Praha aranĝis la 21. feb. sian ĝeneralan kunvenon. Valnà hromada projevila přání, aby se pražští esperantisté v nejkraťší době spojili v jeden spolek, kterým by byl Klub esperantistů v Praze, jakožto středisko původní, a uložila výboru, aby bezodkladně podnikl kroky k dosažení této jednoty. Tento návrh, podaný jednatelem p. K. Procházkou, přijat byl 12 hlasy proti 3 hlasům, načež se valnà hromada odročila na 14 dní, zvolivše předom tříčlenné komité (vl. r. J. Eiselt, Fr. Novák a K. Procházka) k provedení návrhu. Tuto zprávu jistě přijmou všichni

opravdovi esperantistó s potěšením, nebot tímto usnešením odvalen jest balvan, stojící v cestě sjednocení čes. esperantistů. — Verda Stelo, la unuigo de germanlingvaj esper. komencis post la dumilita interrompo sian novan laboron. Le ĝenerala kunveno okazinta la 17. feb. elektis jenan estraron: so. Dro. Ad. Bischitzky (prezid.), so. Jul. Boschan (vicprez.), Fino. E. Borges (sekret.), Hugo Pressburg (kasiso), sino. prof. E. Lederer (bibliot.), soj. Dr. Freund, Mekler kaj Chitz. Oni decidis aranĝi kurson por komencantoj kaj por progresintoj en la nova hejmo »Künstlerinnen-Club«, Perštýn 6. La agado komenciĝos per la parolado de so. Boschan pri »Esperanto dum la milito kaj la paco«, kiu okazos la 3. marton. Samtempe oni aranĝos esp. ekspozicion.

Plzeň. Esperantista klubo aranĝis la 8. de febr. en sia salono (hotelo Svoboda) esp. lumbildan paroladon de so. Pech pri la pentrinda valo de Kokořín. La paroladon partoprenis la membroj de la Laborista societo en Plzeň, de la societo en Doubravka, kaj kursoj el Doudlevec, kaj tial ne sufiĉis la salono por akcepti ĉiujn alvenintojn. — La 23. feb. je la 10. antaŭt. oni aranĝis instruon ekskurson en la urban teatron, kie oni konatiĝis kun la misteroj de la scenejo, kiu laŭ sia grandeco kaj moderna aranĝo estas dua en Ĉeĥoslovakio. Ne malpli interesa estis ankaŭ la vizito de tie troviĝanta akumulatora sekcio de la urba elektrejo. Ankaŭ ĉi tiun ekskurson partoprenis eĉ membroj de aliaj esp. societoj. — La programo de la instrua fako estas por la marto jena: La 1.: Parolado de B. Tittl pri esperanta vortfarado (boheme). La 8.: Parolado de A. Ĝukota pri homa karaktero (esperante). La 15.: Vespere de humoraĵoj. (Vico de partoprenintoj rakontos esperante anekdotojn). La 22.: Daŭrigo de la parolado pri homa karaktero. La 29.: Pri la gramatikaj reguloj de Esperanto. Parolado de B. Tittl. (Boheme). — Popola universitato aranĝos komence de marto esperantan kurson por progresintoj. Instruos so. Balvín. — Ligo de fervojistoj aranĝos por siaj membroj kaj iliaj familianoj kurson de Esperanto. — Popola lernejo de s-dem. partio aranĝos komence de marto duan kurson de Esp. En ambaŭ kursoj instruos so. J. Pech.

Budějovice. Esperantista klubo rekomencis sian laboron la 18. jan. Ĝi aranĝas ĉiun sabato du kursojn: de la 8—9. vesp. por komencantoj kaj de la 9.—10^{1/2}. por progresintoj. Ambaŭ kursoj komenciĝis per parolado de so. Svačina pri signifo de Esperanto. Partoprenas multaj studentoj, kiuj intencas en sia societo »Sdružení« fondi esp. rondeton. La klubo dankas al la direktoro de burĝa lernejo so. Ant. Smetana, kiu dum la lerneja festo aranĝita okaze de la proklamo de bohema memstareco menciis la gravecon de Esperanto por la bohema nacio kaj pruntis unu klason de sia lernejo por tie aranĝi la kursojn. La ĝenerala kunveno okazinta la 8. de feb. elektis por honora membro son. Ot. Husák, kapitanon de ĉeĥoslovakaj legianoj en Francio, kiu estis fervora membro de la klubo. Prezidanto de la klubo estas so. Fr. K. Svačina, sekret. so. V. Matouš.

Liberec. (Reichenberg). Laŭ permeso de la urba komandanto kapitano Dašek gvidas tie ĉi so. subleŭt. Miloš Lukáš esp. kurson por Bohemoj, al kiu aliĝis 33 personoj. Oni baldaŭ fondos esp. societon.

Pardubice. Esperantista rondeto aranĝis dimanĉe la 19. feb. publikan paroladon pri Esperanto. So. Dro. Schulhof parolis pri E. ĝenerale kaj pri siaj dumilitaj spertoj pri ĝi, so. Pitlík el Praha pri sia Eŭropa vojaĝo pere de Esp. kaj so. ing. Berger el Moravany pri la utilo, kiun alportis al li la scio de E. dum la kaptiteco en Serbio. La paroladojn ĉeestis gastoj el Praha, Přelouč kaj Hradec Král. Multaj partoprenintoj de la par. aliĝis al la kurso aranĝita en la legejo de Průmyslové museum (industria muzeo) kaj gvidata de so. ing. Berger.

Přelouč. Dimanĉe la 23. febr. okazis parolado de prof. Pitlík el Praha pri Esperanto en la servo de Ĉeĥoslovaka nacio kaj pri ĝia praktika signifo. La kunvenon vizitis proksimume 100 aŭdantoj, el kiuj 26 aliĝis al la kurso, kiu jam komencis.

Hradec Král. La 2. de feb. estis aranĝita propaganda parolado de so. B. Hromada, sekret. de Esp. societo en Praha pri Esp. kaj esp. movado. Per tiu ĉi parolado komencis la loka klubo sian postmilitan laboron. Al la kurso komencita en fino de feb. aliĝis 20 personoj. En la loka gazeto »Kraj královéhradecký« estas propaganda rubriko. Ĉiuj interesantoj pri la urbo bonvolu sin turni al la loka deligito de U. E. A. so. O. Sklenčka, oficisto de Živnostenská banka.

Olomouc. Dum la kunveno en kafejo »Paříž« la 30. jan. estis decidite fondi krom la nun ekzistanta Bohema klubo esp. alian esp. societon, al kiu povos aliĝi membroj de kiu ajn nacio. Al ĉi tiu nova societo aliĝis jam 20 personoj. La prepara komitato konsistas el soj. Grün, Kudela, Mastný kaj prof. Murath. La kunvenoj okazas ĉiun 1. kaj 3. jaŭdon de monato je la 8. horo vesp. en la kafejo »Paříž«. — 19. feb. malfermo de esp. kurso en burĝa lernejo de Urzulaninoj, gvidata de tre fervora sđanino. fakinstruistino Mater M. Klara, kiun partoprenas 20 lernantoj kaj kelkaj kolegiinoj de la gvidantino. — 20. feb. dum kunveno en kafejo Paříž estis elektita provizora komitato de nove fondota E. societo, kreitaj fakoj instrua, ĵurnalista k. amuza kaj donita instigo por aranĝo de novaj kursoj. Devo de ĉiu membro estas ankaŭ gajni al la societo kelke da novaj anoj.

Zlín. La Rondeto esperantista havas nun 64 aktivajn membrojn. La bulteno de la laboristaro de la fame konata ŝufabriko de T. & A. Baťa enhavas esperante presitan rubrikon pri la movado esperantista, gvidata de so. Fr. Kessler.

NEMCOVÁ:

La patrujon oni devas ami el konkinko, oni devas ĝin koni plenplene kaj oni devas scii, por kiaj celo kaj rezultato oni ĝin amas kaj tiun ardan, konscian amon oni devas fiksi en la koron de la infanoj.

Trad. »Rondeto de esperantistinoj en Praha.«

ALVOKO.

Bohema nacio festos la 11. de oktobro 1924 la 500-an datrevenon de tago, en kiu mortis la glora armeestro Johano Žižka de Trocnov. Bohemaj esperantistoj rememoros plej bone nian nacian heroon, se ili ne lasos jenan alvokon neatentita:

En Bohemujo plivigliĝas lastatempe esperanta movado inter blinduloj. Eĉ soldatoj, perdintaj dum terura milito vidkapablon, lernas diligente esperanton. Sed ili ne posedas reliefe skribitajn aŭ presitajn lernolibrojn, vortarojn k. t. p. Unusola esperanta porblindula gazeto aperanta en Stockholm (Esperanta Ligilo) ne sufiĉas al ili. Tial la redakcio de monata bohema gazeto »Zora«, presita reliefe en pli ol 150 ekzempleroj, ekintencis eldonadi por ĉiu nevidanta abonanto senpage specialan aldonon, redaktotan de prof. Stan. Stejskal, kiu enhavus esperantan lernolibreton, ekzercaron, raportojn pri na movado hejme kaj eksterlande k. s., kondiĉe, ke la gesamideanoj kaj esper. societoj ebligos realigi tiun ĉi ankaŭ propagande signifan entreprenon per afablaj mondonacoj eĉ donacetoj. Niaj unuigoj povus ekzemple decidiĝi pri regula, ĉiujara monsubteno; aliaj samideanoj povus krom tio kolekti monon eĉ inter siaj konatuloj — neesperantistoj. La akirebla rezultato de tiu-ĉi entrepreno fariĝus plej valora monumento starigota je memoro de nia blinda heroo kaj samtempe oni montrus veran komprenon por sindona poresperanta laboro de bohema komponisto kaj blindulpedagogo so. K. Em. Mácán, fondinto kaj ĝisnuna redaktoro de »Zora«, esperanta konsulo por blinduloj, kies 60-an naskiĝjubileo ni ĵus festis. Helpu al li starigi esperantan interblindulan movadon sur tiel firman bazon, ke ĝi fariĝu modelo al fremdlando. Konata esperanta eminentulo, profesoro Th. Cart el Parizo diris siatempe gravajn vortojn: »Pravu utilecon de esperantismo por blinduloj, Vi pruvos utilecon de esperanto ĝenerale!«

Karaj samideanoj! Ne hezitu partopreni ĉe tiel grava monkollekto kaj sendu la monsubtenojn al administrejo de »Progreso«, kiu publikigos nomojn de la afablaj donacintoj.

J. S. Setkal.

ATENTIGO.

Enkonduko de Esp. en lernejojn certe dependas plej grandparte de la instruistaro mem. Por povi tiun ĉi postulon efektiviĝi kun sukceso estas necesa, ke ĉiuj esp. instruistoj en Ĉeĥoslovakio sen diferenco de nacieco aliĝu al la nove fondota societo de Esp. Instruistoj. Ĉar supozeble ne ĉiuj gesamideanoj instruistoj kaj amikoj de Esperanto ankoraŭ abonas »La Progreson« oni petas pri bonvola publikigo de tiu ĉi alvoko en regionaj gazetoj naciaj. Aliĝon akceptas Albin Neuzil, lernejestro en Neředin u Olomouce.

Bohemoj, legu, vastigu
kaj rekomendu!

REPUBLIKÁNSKÉ EPIŠTOLY:

1. *Aznov: Woodrow Wilson.*
2. *Valentin Chilcot: Přehled světové války.*
3. *„Svjatoj Ĉort“ - Griška Rasputin*
4. *Barlameus: Ponorková válka.*
5. *Univ. prof. PhDr. a JUDr. B. Baxa:*

Unupaj numeroj po 40 hal.

Administracio; Plzeň, Nám. Svobody 7.

Se vi deziras havi bonegan internacian gazeton,
abonu:

»ESPERANTO«

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO.
MONATA GAZETO REDAKTATA TUTE EN ESPERANTO.

16—20 paĝoj de plej bona teksto.

En havo: Artikoloj de ĝenerala intereso pri internaciaj problemoj, socialaj demandoj, geografio, ekonomio, scienco. — Literatúraĵoj. — Esperantismo. — Kroniko. — Tra la gazetaro. — Tra la libraro. — Lingvaj studoj. — Anoncetoj.

Jara abono: 12 kronoj, Luksa eldono: 14 kronoj, pageblaj al administr. de »La Progreso« en Plzeň, aŭ Sro. Dro. Sós, Tuchlaubæn 18., Wien.

Senpaga specimeno laŭ peto de la administrejo:

10. rue de la Bourse, Genève (Svisio).

Ĉeĥoslovaka Esperanto - oficejo

(Ĉeĥoslovanská esperantská kancelář)

Praha III., Nerudova ulice 40, III. p.
(fondita de s-o. Aug. Pitlík)

aranĝas Esperanto-propagandon, informas fremdlandon pri kultura kaj politika celado de la Ĉeĥoslovaka nacio kaj prizorgas informojn pri eksporto kaj importado de ĉiuj komercaĵoj.

MATEO,

alie nomata paragvaja teo estas la sola efektive valora anstataŭaĵo por kafo kaj fina teo. Ĝi enhavas 1% da kafeino, efikas refreŝige eĉ kurace. Pura naturaĵo antaŭ la milito rekte importata el Ameriko pere de Esperanto.

Tre taŭga por ĉiutaga trinkado.

Paketojn po 3.— K poŝte ĉien ekspedas kaj pli detalajn klarigojn donas

BOHEMA ESPERANTO-SERVO

(inĝ. L. Berger), Moravany, Bohemujo.

T. & A. BAŤA

ŝuofabriko kaj ledotanejo
ZLÍN-PARDUBICE.

Propraj vendejoj:

Praha, Václavské náměstí 32

Brno, Koblížná ulice 24.

Opava (Troppau), Hrnčířská 14

Wien (Viedeň), Taborstrasse 17a

Kraków, Szewska 22

Czernówitz, Rathausstrasse 4

Lwów, Akademicka 5

Lódz, Piotrkowska 74

Bratislava (Presburg), Michalovská 5

Przemysł, Franciskanska 25.

Zlín, náměstí 60.

Mor. Ostrava, nám. 14.

Znojmo, Kovářská 7.

Kroměříž, Komenského

nám. 107.

Přerov, Ferdinand. 15

Šumperk, nám. 27/28

Hodonín, Masarykovo

18

Olomouc, Kinopasáž

Val. Meziříčí, náměstí

Břeclava, Frant. Jos. 17

Nový Jičín, obch. dům

Jedek

Hranice, náměstí

Vyškov, Pánská 10

Svitava, Brněnská 4

Jihlava, Schillerova 5

Uherský Brod, náměstí

163

Kyjov, Komensk. tř. 4

Místek, náměstí 13

Vsetín, Dolní nám. 304

Kojetín, Masarykovo

náměstí

Krňov, Fr. Jos. nám. 12

Frydek, náměstí

Trenčín, nám., budova

gymn. Pisr.

Malacka, Slovensko

Trnava, Hosp. banka

Žilina (Zsolna), Sze-

chenji 209

Nitra, Slovensko

Růžemberok, Slovensko

Užhorod (Kežmark)

Lučenec (Luczivna)

Nové Zámky

Báňská Bystřice

(Besztercebanya)

Košice (Kassa)

Liberec, (Reichenberg),

Schůckerstrasse 34

Pardubice, budova

spořitelny

Kolín, náměstí 72

Ústí n./L., (Aussig a./E.)

náměstí 28

Hradec Králové, Palác

Zál. a úvěr. ústavu

Ml. Boleslav, Pražská

ul. 116/1

Jaroměř, Husova tř. 91

Jičín, Velké nám. 60

Čáslav, Palackého 63

Dvůr Králové, nám. 57

Německý Brod, Komen-

ského 153

Turnov, Palackého 145

Pízeň, Zbrojnická 3

Čes. Budějovice, Šter-

nekova 18

Kladno, Královská 38.

Jindř. Hradec, Palac-

kého 94

Příbram, náměstí 142

Tábor, Třída Čes.-sl.

legií 640

Písek, Riegrovo n. 26

Louny, Žižkova 305

Náchod, Pražská 63

Klatovy, nám. 170/1.

Karlovy Vary (Karls-

bad), Fr. Jos. tř. 607

Most (Brüx), nám. 82

Amstetten, Viehdor-

ferstrasse 4

Wner. Neustadt (Víd.

Nové Město), Kaiser

Wilhelmstr. 64

Esperantia entrepreno. — Oni parolas kaj korespondas esperante.